

& Printempa kanzono:

< Rekante 35 el 67 battoj por strofo, entute 871 paŝoj dum 9 minutoj. Verkis Jopetro Danvi'. Originan melodion komponis Ĝ. Kapa kaj kantis Ĝ. Molle. Baladigis Martin Strid per la himno de Esperanto, kiun komponis F. de Menil. Klarigoj (*): '1 La jaro 1968-a. '5 Ĉeĥoslovaka Respubliko Socialisma, kiun en tiu jaro invadis Sovetunio por venki ribelon. '8 Fama franca universitato Sorbonne.>

(#Melodio:

(# La himno de Esperanto: <1,75:>

So3So /So Mih do3So mi3do /so o mih; So3do /mi doh so3mi mi3re /re e doh; So3So /So Mih do3So mi3do /so o mih; Ti3mi /so mih so3fi mi3ma /fi i mih;

(#Rekantaje: mi3mi /fa La TiTi dore /So o Lah; La3La /Ti do re3re ma3ma /mi i fah; So3So /So Mi do3So mi3do /so o fah; fa3fa /mi Soh mi3re fa3Ti /re e doh; So3So /do re;)

)×13)+

(&Strofoj:

< "La sesdekoka: ĉu decida jaro? memoroj pri la sesdekoka, revoj pri la sepdekoka, okdekoka".>

'1 estis /antaŭ majo sesdek/oka*, ; knabi/netoj saĝe trinkis "/koka" ; kaj a/tente legis maga/zinojn ; ne fu/roris ĉie la blu/ĝinoj.

(×: **Kio /estas do ĉi granda /tio? ; Nu, ĝi /estas la revolu/cio ; kiu /en printempo gajnas /forton, ; do dis/voku la inspiran /vorton ; kantu /ĝoje.)**

'2 gape lernis mi en gimnazio ; kaj min lulis dolĉe iluzioj. ; min amuzis tute dum vesper' ; la klaketoj lumaj de l' fliper'.

'3 profesoroj tute seriozaj ; monologis per vakuoj frazaj ; kaj enuo regis sen insido ; super revoj foraj de rapido.

'4 kaj subite, iun tagon sunan, ; venis brue al ni movinklino. ; sunis, estis fine de l' trankvilo ; sunis, estis fino de aprilo.

'5 per flugiloj de l' facila vento, ; vikle aljetitajn de studento ; ŝtonojn kubajn por C.R.S.* ; tuj varmiĝis la etoso.

'6 ĉiunokte, ĉiutage, ; stratoj iĝis kraĉo sage, ; troviĝis la rapido, ; klaĉe blekis televido.

'7 en parizo iris forta voko ; malgraŭ ŝlima stulta moko, ; junaj ridoj per malfermaj buŝoj ; forfuĝigis la maljunajn muŝojn.

'8 generalo, pro abrupta sveno, ; ekri fuĝis en baden-badeno. ; la antikva krio al la bono ; muĝe disradiis en sorbono*.

'9 sed alvenis fine en junio ; (io juna – etimologio!) ; la finrevo pro la suna palo. ; estis plena ĉiu hospitalo.

'10 iluzioj en la poŝoj, kaŝe, ; kaj amara buŝodoro maĉe, ; tempo kuras laŭ horloĝo trista; koro batas laŭ inklino brusta.

'11 jam dek jaroj fuĝis paŭte ; kaj esperoj kaŝe, haŭte. ; ne plu videblas la pavimo, ; ĉie ĝin superas la bitumo.

'12 turoj konstruiĝas kamizole ; amasiĝas homoj laŭ-tavole. ; en la lando regas strangaj voloj, ; devas ĉiuj Vivi en skatoloj.

'13 sed revenas voke la cifer' ; – ĉu memoro ruza pri fliper'? – ; de ĉi-deko estas jaro oka. ; nombroj vokas urĝe. ĉu provoka?)